# juna amiko

93/1




ilei

NUMERO 64

Karaj legantoj!

Jen ni transdonas en viajn manojn la unuan ĉi-jaran kaj pli ampleksan numeron de *Juna amiko*. Ni esperas, ke ĝi plaĉos al vi.

Ni deziras kore danki al niaj fidelaj legantoj, kiuj alsendis leterojn esprimante opinion pri la revuo. Viaj kontribuaĵoj, konsiloj, admonoj eĉ riproĉoj tre helpas al ni en la redaktado.

Aparte varmajn dankvortojn ni deziras esprimi al samideanino Nora Caragea el Germanio, kiu alsendis tre interesajn kontribuaĵojn — verkojn de junuloj pri siaj mondo, timoj kaj esperoj — tiujn ni serie aperigos ekde la venonta numero. Samajn dankojn ni direktas al samideanino Zofia Mirska el Pollando, kiu sendis kelkdek porinfanajn poemojn. Vi trovos ilin en ĉiu numero, sur la kvar mezaj paĝoj. Tiuj paĝojn vi povos facile elpreni kaj en la fino de la jaro vi povos fari el ili 16-paĝan libreton kun titolo 'Fabela mondo'.

Ni kore salutas vin atendante senpacience viajn leterojn kaj opiniojn.

Amike,

Esperantina.
Stefan.

*(24 feb 93)*

**Juna amiko**, internacia revuo por lernejanoj kaj komencantoj. Eldonata de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

**Aperas** kvarfoje jare::
februare, aprile, septembre, novembre.

**Redaktoro:** Stefan MacGill.
**Help-redaktoro:** Esperantina Mirska

**Adreso de la redakcio:** pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario. ISSN 0230-1318

**Abonprezo**: Internacie ĉe UEA: 16,00 NLG. Ĉe la kasisto de ILEI 50 SEK (B. Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio, pĝk. 682117-7 (Stokholmo). En Hungario: 160 HUF (donacabono por eksterlandano 300 ft.) ĉe la Hungara ILEI-sekcio: M. Kovács, Ady Endre u. 23-25c, H-1221 Budapest. Perantoj en 30 landoj; multaj ofertas nacivalutajn abonkotizojn. Reform-eŭropaj landoj 300 HUF. Grandaj rabatoj (ĝis 50%) por kvantaj mendoj.

**Anoncoj:**

Kvaronpaĝo: 400 HUF enlande aŭ 40 NLG aŭ 4 jarabonoj en aliaj okcidentaj valutoj.

Duonpaĝo: 600 HUF aŭ 60 NLG. aŭ 6 jarabonoj.

Tuta paĝo: 800 HUF aŭ 80 NLG. aŭ 8 jarabonoj.

## Ĉieldirektoj

Ho hela ORIENTO!
Pli hela suna SUDO!
Vi venta OKCIDENTO,
kaj ĉiam morna NORDO!

Ke mi la vojon rektan,
la celdirektan vidu:
Ho, vi ĉieldirektoj,
min ĉiam bone gvidu!

Orflava ORIENTO,
kie la sun' leviĝas,
kaj varme-vunda SUDO,
kie la sun' zenitas,



Sangruĝa OKCIDENTO,
kiu al dorm' invitas,
kaj malvarmega NORDO,
kiu nur nokton vidas.

Ho NORDO antaŭmia,
kaj SUDO post la dorso!
Maldekstra OKCIDENTO
kaj dekstra ORIENTO.

Ke mi la vojon rektan,
la celdirektan vidu:
Ho vi, ĉieldirektoj,
min ĉiam bone gvidu!

*Blazio VAHA, Budapeŝto*

## Demandoj:

La poemo kaj la demandoj estis verkitaj por nord-hemisferanoj!

1. Kie la suno leviĝadas?
2. Kie la suno zenitas? (=estas plej supre.)
3. Kie la suno videblas antaŭvespere?
4. Kie oni vidas la sunon neniam?
5. Kiukolora estas la ĉielo, kiam la suno estas okcidente?
6. Kia estas la ĉielo, kiam la suno estas plej supre?
7. Kie estas la suno matene?
8. Kie estas sudo, kiam oni rigardas al nordo?
9. Se nordo estas antaŭ ni, kie estas okcidento?
10. Se nordo estas antaŭ ni, kie estas oriento?
11. Ĉu la suno preferas sudon aŭ nordon?
12. Ĉu en somera tago, vespere je la oka, oni vidas la lastajn radiojn de la subiranta suno okcidente aŭ oriente?
13. Kie la suno subiradas?
14. Kie estas Francujo?
15. Kie estas Italujo?
16. Kie estas Rusujo?
17. Kie estas Hindujo?
18. Kie estas Svedujo?
19. Kie estas Ĉilio?
20. Kiu lando, najbara por vi, estas oriente?
21. Kiu lando, najbara por vi, estas okcidente?
22. Kiu najbara landoestas norde?
23. Kiuj landoj havas limon kun via lando sude?
24. Ĉu vi scias, kiuj maroj limas Eŭropon?
25. Kiuj maroj limas Afrikon?
26. Kiuj estas la kvar ĉieldirektoj?

## La sciuro

**Kure, kure, nuksospure**
**voste - poste ĝi impetas.**
**Halto, salto; vin el alto**
**lude stude okuletas.**

*Mike Sadler GB/H.*



**Ranko Simoviĉ:**

## Ĵus kuirita lakto



Mi alĵusis trafe por vera festo:
patrino melkas bovinon. Ŝi sidas
sur tripieda seĝo, kaj mi vidas
amikan rigardon de la kara besto.

Antaŭ foriro, kvazaŭ prisorĉante,
panjo alparolas la bovinon lante.
La bovin' aŭskultas lakton donante.

Poste mi sekvas la malnovan manieron
por kuiri lakton sur kutima loko.
Per fajrotenilo kaj per fulga hoko
panjo ŝovas cindron, instigas fajreron
kaj sekajn branĉetojn atente almetas.
Dume ŝi ternas, pro fumo tusetas;
ligno odoras, arda forno pretas.



Panjo filtras la varman melkaĵon tiam
tra punteca, roze kuntirita tolo.
Baldaŭ ĝi ekkreskas en kaserolo.
Panjo miksas bolan ŝaŭmon kaj mi jam
atendas okazon de la fina sceno:
ŝi pecigas panon el maiza greno
en lakton por mi, kun milda mieno.

*Esperantigis: Radojica Petroviĉ*

# La telegramisto

*Skeĉo, kiun vi povos aktori en via klaso aŭ grupo. Multan amuzon!*

**Sceno:** Antaŭ la pordo de apartamento.

**Roluloj:** • Telegram-liveristo, kiu havas uniformon. Ĝi havas insignon sur la ĉapo kun ne nur la poŝta korno, sed ankaŭ muzik-notoj.

• Loĝanto de la apartamento: mezaĝa viro.

*Telegramisto alvenas kaj frapas ĉe pordo. Apartamentano malfermas ĝin.*

**Telegramisto:** Bonan tagon sinjoro! Mi estas telegramisto. Mi havas telegramon por vi. *(Nenion faras).*

**Apartamentano:** Nu, bone! Bonvolu doni ĝin al mi.

**Telegramisto:** Ho, ĝi ne estas tia telegramo, kiun mi povas **doni** al vi!

**Apartamentano:** Ne povas doni al mi? Kial ne?

**Telegramisto:** Ĉar mi jam parkeris la enhavon kaj forĵetis la paperon!

**Apartamentano:** Vi parkeris ĝin? Vi memoris ĝin?

**Telegramisto:** Jes, mi enkapigis la mesaĝon. Mi havas bonan memoron.

**Apartamentano:** Nu, bone. Bonvolu **diri** la telegramon al mi.

**Telegramisto:** Ho, ĝi ne estas tia telegramo, kiun mi povas **diri** al vi.

**Apartamentano:** Ne povas diri al mi? Kial ne?

**Telegramisto:** Ĉar mi estas kantanta telegramisto! Mi devas **kanti** ĝin al vi!

**Apartamentano:** Ve! Nu, bone, kantu al mi mian telegramon.

**Telegramisto:** Bonege! *(Elprenas fajfilon por havi la komencnoton — ekkantas laŭ la melodio 'Ĝojan tagon' — la naskiĝtaga kanto)*

Ĝojan tagon al vi, ĝojan tagon al vi,
Jen kantata, kara Janĉji, Naskiĝtaga salut'!

**Apartamentano:** Momenton! Mi ne estas Janĉji, kaj ne estas mia naskiĝtago!

**Telegramisto:** Ho, ve! Mi bone memoris la telegramojn – eble mi miksis ilin.

**Apartamentano:** Do, ne plu ĝenu min. Adiaŭ! *(fermas la pordon)*

**Telegramisto:** *(frapas la pordon)* Sed sinjoro, mi havas aliajn telegramojn, unu certe estas por vi. Elvenu kaj aŭskultu!

**Apartamentano:** *(Elvenas):* Espereble vi ne havas tro multajn. Eble estos grava mesaĝo por mi, do mi aŭskultos viajn telegramojn, sed bonvolu kanti rapide, mi estas boliganta ovon interne!

**Telegramisto:** Certe, sinjoro. Mi prenos mian fajfilon por rapidaj kantoj. *(Li elprenas alian fajfilon, blovas ĝin kaj ekkantas laŭ 'Brilu brilu eta stel''):*

Brilu, brilu, Damo Stel', Monde fama pro la bel'
Amikiĝu mi kun vi, Tru-kolekton montros mi!
Venu, venu Damo Stel', Rendevue en hotel'!

**Apartamentano:** Sufiĉa! Sufiĉa! Ne kantu plu! Unue, mia nomo ne estas Stel'. Due, mi ne estas Damo, trie mi ne estas aparte bela.

**Telegramisto:** Efektive, vi pravas. Eĉ mi dirus, ke vi estas aparte malbela!

**Apartamentano:** Hmmf! **Mia** telegramo, bonvolu kanti **mian** telegramon.
**Telegramisto:** Do, mi provos trovi alian por viro. Ha jes! *(Fajfas, ekkantas laŭ la melodio 'Esperanto estas la lingvo por ni' ekde la strofo.)*

Saluton sinjoro Abento, Ni aŭdis, ke suferis vi
pro aŭtomobil-akcidento, Notindas la ĉi sekve kri' –
Ri-pa-ra-do estas la tasko de ni, de ni! Ne-tro-al-ta estos fakturo de ni!

**Apartamentano:** NE! NE! NE! Mi ne estas s-ro Abento, mi ne suferis akcidenton, mi eĉ ne posedas aŭtomobilon – kaj se mi havus, mi certe ne riparigus ĝin ĉe kompanio, kiu kapablas krei tiajn abomenindajn reklam-sloganojn! Mi jam aŭdis tri el viaj stultaj kantataj telegramoj kaj sufiĉas! Mia ovo certe jam ŝtoniĝis! Foriru! *(Li brufermas sian pordon).*
**Telegramisto:** Sed, sinjoro, sinjoro, bonvolu reveni!
**Apartamentano:** *(de interne):* NE!!!
**Telegramisto:** Sed, sinjoro, mi havas unu telegramon, kiu ne estas kantenda!
**Apartamentano:** *(Malfermas la pordon iomete)* Ĉu ne kantata telegramo?
**Telegramisto:** Absolute ne, sinjoro!
**Apartamentano:** *(Elvenas kun ŝtoniĝinta ovo)* Kiuspeca telegramo ĝi estas?
**Telegramisto:** Ĝi, sinjoro estas..... **kanto-danca** telegramo!!!
**Apartamentano:** Aaaaaaaaarghhhh! Absolute ne! Foriru! *(Li fermas la pordon, sed la telegramisto jam metis sian piedon en la pordotruon.)*
**Telegramisto:** Aaaaargggh! Mia piedo! Ho, la vivo de telegramisto ne estas facila! Elvenu, sinjoro! Vidu kaj aŭdu mian kanto-dancan telegramon!
**Apartamentano:** Ve! Kial ne? Mia ovo jam estas detruita. Kantu, dancu!
**Telegramisto:** *(Surmetas dancŝuojn, prenas fajfilon, kantas laŭ 'Klementin")*

Lastsemajne, iris trajne, perdis palton en vagon',
Tion mi trovis, kaj konservis, kaj en Jorko tenas ĝin. *(dancas )*
Viajn nomon kaj adreson, trovis mi en ĝia poŝ'
Venu al mi, rericevi, ne pagendos unu groŝ!

**Apartamentano:** Ho, mirinde! Lastsemajne mi ja veturis trajne! Kaj la trajno plu iris al Jorko. Kaj mi perdis palton! Mian plej ŝatatan palton! Kaj, jes, mi memoras, mia nomo kaj adreso estis skribitaj sur paperpeco en unu poŝo. Bonege! Tiu mesaĝo **estas** por mi! Mi ege volas rehavi tiun palton!
***Telegramisto:*** *Kia sukceso! Tiu telegramo ja estas por vi. Bonege, denove la* poŝto brile plenumas sian taskon! Mi tre ĝojas! Ĉiam je via servo, sinjoro, ĝis revido!
**Apartamentano:** Sed, ne foriru! Diru, kiu sendis al mi tiun telegramon!
**Telegramisto:** Ĉu vi ne aŭskultis? Iu sinjoro, kiu loĝas en Jorko!
**Apartamentano:** Sed mi devas scii liajn nomon kaj adreson!
**Telegramisto:** Liajn nomon kaj adreson? *(paŭzo)* Sinjoro, ĉu vi ne ĵus aŭdis, kiom da telegramoj kaj kiom da melodioj mi devas memori! Vi ne serioze supozas, ke mi krome kapablas memori la nomojn kaj adresojn de ĉiuj senditoj, ĉu?
**Apartamentano:** Sed, sed..... ĉu vi vere ne scias, kiu sendis tiun mesaĝon?

**Telegramisto:** Ne!
**Apartamentano:** AAAAAAAAARRRGGGGGHHHHH! *(kolapsas svene).*
**Telegramisto:** Ankoraŭ unu kontenta kliento!
*(foriras fiere kantante laŭ la melodio 'Frat' Jakobo')*
Te-le-gra-moj, te-le-gra-moj, En memor', en memor'
Servo de la poŝto, Servo de la poŝto, Kantas mi, kantas pli!

* * * * *

## Kie mi estis...

Kie mi estis – verdaj terbedoj
emanas freŝan, herban aromon
de cikonioj fortaj pikedoj
gardadas sian subnuban domon.

Kie mi estis – ventmuelilaj
staras skeletoj vermoboritaj,
likenohavaj, jam senutilaj,
senmovaj eĉ dum ventoj subitaj.

Kie mi estis – rivero streta
kun akvofluo lanta, obstina,
sur riverbrako akor' verdeta,
apude kampa flor' karmezina.

Kie mi estis – lontano svaga,
senvojo vasta, ventosuspiro,
tien dum vivovojo zigzaga
certe revenos mi – pro sopiro!

verkis: Esperantina MIRSKA
Budapest


UNU BELAN TAGON, LA TUTA FAMILIO TESTUDI DECIDIS KUNE PROMENI
TESTUDOJ KAJ GLACIKREMOJ
KONCEPTIS: STEFAN MACGILL
DESEGNIS: PAVEL RAK
NI PIEDIRU AL LA URBO
ĈU NI RAJTAS MANĜI GLACI-KREMOJN?
EBLE, SE VI BONE KONDUTOS
POST DU TAGOJ ILI ATINGAS LA GLACI-KREM-BUTIKON
ANKAŬ MI! NI TRE BONE KONDUTIS!
HEJMO
2 TAGOJ
MI VOLAS GLACIKREMON
JES, VI BONE KONDUTIS, DO NI ENIRU!
GLACIKREMOJ
KVIN GLACIKREMOJN NI PETAS!
GRANDAJN!
BONE, TRIDEK KVIN STELOJN MI PETAS!


KATASTROFO! PAĈJO PREMAS SIAJN POŜOJN KAJ SERĈAS SUB SIA ŜELO!..LI LASIS SIAN MONUJON HEJME!
BEDAŬRINDE, MI NE HAVAS MONON!
NI DONAS KREDITON NUR AL NAŬDEKJARULOJ AKOMPANATAJ DE SIAJ GEAVOJ! NENIU KREDITO POR VI! VI DEVAS PAGI!
KREDITO
DO ILI ORGANIZAS FAMILIAN KONFERENCON...
IU DEVAS IRI HEJMEN KAJ PRENI MIAN MONUJON!
KIU KURAS PLEJ RAPIDE?
FOR!
LAŬ!
DILIGEN!
FOR KURAS PLEJ RAPIDE! FOR, KURU HEJMEN KAJ PRENU MIAN MONUJON!
SED DUM MI ESTOS FOR, VI MANĜOS MIAN GLACIKREMON!
BONE!
NI PROMESAS, KE NI NE TUŜOS ĜIN!
NI PROMESAS!


DO, SE LI PORTOS LA MONON, VI RAJTOS MANĜI LA GLACIKREMOJN.
LAŬ LA PROMESO, ILI NE TUŜAS LA GLACIKREMON DE FOR. SED PASAS UNU SEMAJNO KAJ FOR NE REAPERAS.
HO, VE! FOR VERE ESTAS FOR! ĈU LI PERDIĜIS?
KIOM BELA ESTAS LA RESTANTA GLACIKREMO
NE, LI BONE KONAS LA VOJON
PASIS DU SEMAJNOJ...
VE! IRI KAJ REVENI BEZONAS NUR KVAR TAGOJN. PLUS UNU POR TROVI LA MONUJON. SED NUN PASIS DU SEMAJNOJ LAŬ MIA BRAKKALENDARO!
HO, VE, ĈU SOVAĜA BESTO KAPTIS LIN?
NE. ĈIUJ SOVAĜAJ BESTOJ JAM FORMORTIS
NI MALSATAS! KIOM BONGUSTA KAJ ALLOGA ESTAS TIU GLACIKREMO!
PASAS TRI SEMAJNOJ!
TERURE! CERTE IO MALBONA OKAZIS AL LI! NI IRU SERĈI LIN!
TIUKAZE ĈU NI RAJTAS MANĜI LIAN GLACIKREMON?
NU JES, KIAL MALŜPARI ĜIN
HURA!!
SED, SUBITE DE MALANTAŬ KURTENO, APERAS FOR!
SE VI TUŜOS ĜIN MI EĈ NE FORIROS!

# 27a ILEI KONFERENCO kaj 2a GIMNAZIO DE ILEI

Tiuj du eventoj okazos en Hispanio, tuj post la Universala Kongreso en Valencio. Do, la datoj por la instruista konferenco estas de la 31a de julio (sabate) ĝis la 6a de aŭgusto (vendrede) 1993.

La situo kaj kondiĉoj estas tre favoraj. Gastigos nin la vilaĝo La Paterna, tuj ekster Valencio (enlande) kaj ligita al ĝia urbocentro per rekta metro-linio. La konferencejo estos tri-stela hotelo nomata 'La Paterna', kiu proponas komfortajn (laŭ niaj normoj – luksajn) klimatizitajn ĉambrojn (unu-, du- kaj pli-litajn), kun bano, televido kaj telefono. Ĝi troviĝas rande de la vilaĝo apud oranĝarbaro. La hotelo havas 180 litojn en 70 ĉambroj – ni provizore rezervis 120, sed ni devos anonci definitivan mendon kaj part-pagi anticipe, do senprokrasta mendado estas grava. Ni preparos aliĝilon kaj sendos ĝin al la landaj sekcioj de ILEI, kaj aperigos ĝin ankaŭ en IPR 93/1.

La hotelo povos disponigi almenaŭ unu klimatizitan kunven-salonon, pliaj salonoj troviĝas en najbara lernejo 'La Salle', kiu entenas elstaran natursciencan muzeon. La inaŭguron ni verŝajne okazigos en la urbodomo de La Paterna, kies instancoj estas helpemaj. Du restoracioj kaj bufedo estas ligitaj al la hotelo. Ĉi tiu hotelo kompreneble kostas pli ol la pli frue celata junular-gastejo, sed, pro personaj kontaktoj, ni ricevis tre favoran prezon, kiu permesas al ni praktike konservi la rekorde nealtan guldenan kotizon de la antaŭa jaro. Jen kion ni anoncas por restado en 2-lita ĉambro:

TARIFO A: 340 NLG 1200 SEK 21.000 ESP
TARIFO B: 240 NLG 800 SEK 8000 HUF 3500 slovakaj kronoj.

**A:** Loĝantoj de okcidenta Eŭropo, Nord-Ameriko, Japanio kaj Aŭstralazio.
**B:** Ceteraj landoj. Post la 31a de majo ĉiuj kotizoj altiĝos je 20%. Studentoj kaj instruistoj de la gimnazio ricevos rabaton de 20%.

Guldene oni povas pagi al UEA ĉe la konto de ILEI, **ilek-a**. Svedkrone oni povas pagi al la kasisto de ILEI (v.p.2). La favora tarifo en pesetoj estas nur por loĝantoj de Iberio (Hispanio kaj Portugalio). La tarifoj en forintoj kaj slovakaj kronoj estas nur por loĝantoj de reform-eŭropo, kaj estas pagendaj resp. al la hungara ILEI-sekcio (v.p.2) kaj E-Centro Poprad.

Kiu ne ricevos IPR povas peti aligilon de la redakcio de *Juna amiko.*

Dum la konferenco ni parolos pri ĉiuj aspektoj de instruista trejnado – partoprenos d-ro Duncan Charters, profesia trejnisto de lingvo-instruistoj en Usono, kiu estos gvidinta kurson en Kultura Centro Esperantista de la 9a ĝis la 17a de julio. Tre fruktodonajn diskutojn ni povos antaŭvidi.

Kaj kompreneble, la gimnazio! Pri la unua vi povis legi tri raportojn en *Juna amiko*. Kaptu la okazon partopreni la duan en la suno-plena Hispanio!

# Sinjoro Tvardovski

**pola legendo**

Antaŭ multaj jarcentoj vivis en Krakovo, tiama ĉefurbo de Pollando, sinjoro Tvardovski. Li estis fama kuracisto kaj riĉa homo, sed tio ne kontentigis lin. Li avidis sorĉadi. El iu pramalnova libro sinjoro Tvardovski sciiĝis, ke oni povas kontrakti kun diablo kaj kontraŭ la propra animo akiri sorĉopovon. Li ne hezitis kaj noktomeze iris eksterurben, kie ĉe vojkruciĝo kreskis olda saliko. Oni diris, ke en ĝia interno loĝas diablo. Sinjoro Tvardovski alproksimiĝis al la saliko kaj trifoje laŭte ekkriis: "Diablo venu!", "Diablo venu!", "Diablo venu!".

Tuj antaŭ li aperis eleganta, belkorpa junulo. La frako faris la diablan voston nevidebla, ĉapelo kaŝis la kornojn kaj brilpurigitaj ŝuoj kovris la hufojn. La diablo afable diris: "Jen mi venis. Kion vi deziras sinjoro?"

"Mi volas sorĉadi kaj fariĝi ĉiopova".

"Konsentite. Vi scipovos sorĉi, sed unue bonvolu subskribi la cirografon" diris la diablo enmanigante al sinjoro Tvardovski paperfolion.




"Mi subskribos ĝin sub jenaj kondiĉoj: vi rajtos preni mian animon nur en Romo kaj ĝis tiu tempo vi estos mia obeema servisto. La diablo grimacis, marĉandis, sed fine cedis. Sinjoro Tvardovski pikvundis sian fingron kaj per la sango subskribis la cirografon. Li estis kontenta pri la negoco kaj ruze ridetante pensis: "mi neniam veturos al Romo, do la diablo ne ekposedos mian animon".


Venis tagoj de sorĉado. Sinjoro Tvardovski flustris: "kaleŝo!" — kaj tuj aperis eleganta kaleŝo tirata de ses blankaj ĉevaloj kun servopreta lakeo — diablo atendanta ordonon kien veturigi la sinjoron. Alifoje sinjoro Tvardovski deziris regali siajn amikojn, do li eniris la manĝoĉambron kaj diris: "primetu la tablojn"! Tuj aperis longaj tabloj, sur ili diversspecaj frandaĵoj: apetitveka rostaĵo, tortoj, boteloj da bonkvalita vino. Se la sorĉisto deziris viziti Parizon aŭ Vienon ordonis: "venu flugveturilo"! — kaj jen staris ĉe li grandega koko (la flugmaŝinoj tiam ne ekzistis). Sinjoro Tvardovski povis rajdi sur ĝi al la celata loko. La senzorga, feliĉa tempo daŭris longajn jarojn.

La diablo malpacienciĝis, postulis la animon de la sorĉisto, tamen tiu nur ridis kaj mokis la kornulon. Sed abrupte ĉio finiĝis. Iun vesperon venis al la fama kuracisto ploranta knabeto kaj petegis: "Savu mian paĉjon, sinjoro doktoro! Li estas mortanta." Sinjoro Tvardovski iris kun la knabeto kaj tiu *kondukis lin al la drinkejo. Tuj ĉe la sojlo staris la diablo kaj diris: "Tiu drinkejo* nomiĝas Romo. Via animo apartenas al mi!" Dirinte tion la diablo kaptis la teruritan kuraciston je la mano kaj ili ambaŭ forflugis tra la kamentubo.

Kiam ili troviĝis ĉe la luno, sinjoro Tvardovski eldiris sorĉvortojn, kiujn ĉiuj diabloj tre timas. Ili tuj efikis. La diablo terure ŝrikis kaj forkuregis. Sinjoro Tvardovski grimpis sur la lunon, kie li ĝis nun sidas. Se vi dum plenluno rigardas la teran sateliton, vi vidas sur ĝia surfaco etan makulon. Tio estas la fama krakova sorĉisto sinjoro Tvardovski.

*Zofia Mirska*
*Pollando.*





**VORTKLARIGOJ**

**sorĉi: fari magiaĵojn**
**olda: maljuna**
**saliko: speco de arbo**
**frako: eleganta vestaĵo**
**hufo: besta piedo**
**cirografo: speco de kontrakto**
**marĉandi: disputadi**
**kaleŝo: malnovspeca veturilo**
**regali: proponi festenon**



**Ni volonte ricevos similajn fabelojn el aliaj landoj! Sendadu ilin al ni! Ni volas aperigi pli da verkoj de legantoj – kelkaj legantoj petis, ke ni faru tion. Sed tio postulas, ke aliaj kelkaj legantoj fakte kontribuu! Eble vi?**


kaŭrosaŭro
flaŭrosaŭro
taŭrosaŭro
1
2
3
laŭrosaŭro
LA MONDO DE SAŬROJ
SMG
bedaŭrosaŭro
restaŭrosaŭro
aŭrosauro
centaŭrosaŭro
bakalaŭrosaŭro
baldaŭ-
saŭro!


# ZOFIA MIRSKA

# FABELA MONDO

POEMOJ
POR
INFANOJ

# Muŝo kaj kulo

En la ĉambroangulo
sidas muŝo kaj kulo,
ambaŭ gaje, amike babilas.
"Ĉu vi sanas muŝeto"?
Diras kul' kun koketo
„Flugiletoj al vi ĉarme brilas."
Al la muŝo la flato
de la kul' diplomato
tre ekplaĉis. Ŝi milde ridetis
respondante: „ha, dankon,
ne suferas mi mankon
de la sano". Kaj poste ekpetis:



„Mia kara kuleto!
Tie estas la reto
de danĝera por ni araneo.
Do, akceptu konsilon:
tre evitu kaptilon!
Fali reton ja estas pereo."
Vane nigra kaj dika
araneo buŝpika
reton streĉis precize, inside.
Dume muŝo kaj kulo
en la ĉambroangulo
babiladas zum-zume, plenfide.

## Rana reĝo

Iras kokcinelo bela
tra la sorĉa mond' fabela
kaj rigardas diafanan
akvan reĝolandon ranan.
Tie sur la ŝtona trono
sidas reĝ' en konka krono.
Sceptron havas reĝo rana
el la verda spiko kana,
el folio kamizolon,
en la mano orskatolon.

La paĝioj apudsidas,
kva-kva-kva-sonore ridas,
ĉiuj estas la ranidoj.
Vaste sonas tiuj ridoj,
ĝis tedita reĝo-rano
svingas per la sceptro-kano
kaj ekkvakas: ĉit paĝioj!
Troe laŭtas viaj krioj!
Tuj fariĝas tre silente,
la paĝioj sidas pente,
ĉiu sur la ŝtona peco.
Regas plena seriozeco
en la reĝolando rana
sub la verda sceptro kana.



# LA KVAR-RESPONDA KVIZO

**Nur unu el la kvar respondoj estas korekta — sed kiu!?**

1. Kiel oni nomis la regantojn en 19-jarcenta Ruslando?
   A: Sultanoj. B: Faraonoj.
   C: Kamaradoj. Ĉ: Caroj.

2. En kiu lando troviĝas la plej alta akvofalo en la mondo?
   A: Argentino. B: Svislando.
   C: Bolivio. Ĉ: Venezuelo.

3. Kiun lingvon oni uzas por la plimulto de operaj terminoj?
   A: La rusan. B: La anglan.
   C: La italan. Ĉ: La francan.

4. Kiu estas la ĉef-urbo de Kanado?
   A: Toronto. B: Otavo.
   C: Kebekio. Ĉ: Montrealo.

5. Kiun lingvon oni plej vaste parolas en Sud-Ameriko?
   A: La anglan. B: La hispanan.
   C: La portugalan. Ĉ: Neniuj el tiuj.

6. Kiom da lingvoj estas parolataj de pli ol miliono da personoj?
   A: Proksimume cent. B: Proks. kvindek.
   C: Proksimume ducent. Ĉ: Proks. ducent kvindek.

7. Kie troviĝas la plej longa fervoja tunelo en la mondo?
   A: Inter Francio kaj Britio. B: En Japanio.
   C: Inter Usono kaj Kubo. Ĉ: En Svislando.

8. Kiel oni nomas libron, kiu donas la difinojn de vortoj?
   A: Atlaso. B: Vortaro.
   C: Volumo. Ĉ: Enciklopedio.

9. Kiu lanĉis la dirajôn: 'Ni fosu nian sulkon!'?
   A: Zamenhof. B: Louis de Beaufront.
   C: Edmond Privat. Ĉ: Theophile Cart.

10. En kiu urbo troviĝas la Koloseo kaj la Forumo?
    A: Parizo. B: Romo.
    C: Londono. Ĉ: Ateno.

**11.** Kiu estas la plej granda flugo-kapabla birdo?

**A:** Struto. **B:** Albatroso.
**C:** Pelikano. **Ĉ:** La ora aglo.

**12.** Kiu veturis al Varsovio kaj renkontis Zamenhof en decembro 1916?

**A:** Generalo Sebert. **B:** Hector Hodler.
**C:** Edmond Privat. **Ĉ:** Ivo Lapenna.

**13.** Kiel vespertoj sukcesas kapti flugantajn insektojn nokte?

**A:** Per infra-ruĝa lumo. **B:** Per efikaj okuloj.
**C:** Per ultra-viola lumo. **Ĉ:** Per ultra-frekvencaj eĥoj.

**14.** Katalizado, emulsio kaj titrado rilatas al kiu stud-temo?

**A:** Transporto. **B:** Fiziko.
**C:** Filozofio. **Ĉ:** Kemio.

**15.** Kiu el la subaj landoj havas kvin najbarojn?

**A:** Svislando. **B:** Nederlando.
**C:** Hungario . **Ĉ:** Luksemburgo.

**16.** 'Pelagro' estas ........... termino.

**A:** muzika **B:** arkitektura
**C:** medicina **Ĉ:** kuirarta

**17.** En kiu lando troviĝas la sun-energia forno de Odeillo?

**A:** Hispanio. **B:** Portugalio.
**C:** Francio. **Ĉ:** Tunizio.

**18.** Kiu verkis la romanon 'Kazinski venis tro malfrue'?

**A:** Julio Baghy. **B:** Kalomano Kalocsay.
**C:** Derk Dorval. **Ĉ:** Johán Valano.

**19.** Kiu maro kuŝas inter Alasko kaj Sovet-Unio?

**A:** La Kaspia Maro. **B:** La Balta Maro.
**C:** La Vladivostoka Maro. **Ĉ:** La Beringa Maro.

**20.** Kiu estas la nomo de la patro de Zamenhof?

**A:** Frederiko. **B:** Marko.
**C:** Felikso. **Ĉ:** Lazaro.

**21.** Kiu planedo estas la plej proksima al la suno?

**A:** Saturno. **B:** Venuso.
**C:** Marso. **Ĉ:** Merkuro.

**22.** Kiom estas 13-oble 13?


**A:** 196 **B:** 169 **C:** 139 **Ĉ:** 193

**Via sumo el dudek du poentoj:**


# VERBOJ: UNU- KAJ DU-LIGAJ

Jen ni prezentas pli da unu-ligaj kaj du-ligaj verboj. Provu ekzerci kaj memori ilin! Sur la sekva paĝo ni prezentas la promesitajn ses orajn regulojn, kiuj helpos vin ĉiam uzi la -N ĝuste.

UNU-LIGAJ:




DU-LIGAJ



# LA SES ORAJ REGULOJ POR LA UZO DE LA FINAĴO -N

| | *Formulo:* | *Regulo:* | *Ekzemploj:* |
|---|---|---|---|
| 1. | **O estas O** | Akuzativo estas gramatikaĵo. Ĝi estas simpla. | Hundo estas bona besto. Tiu estas mia hundo. Tio estas kaj restas fakto. |
| 2. | **Okazas IO** | Ne necesas akuzativo kun unu-liga verbo. Necesas nur subjekto. | Staras hundo. Magiisto aperas. Venas li. Malaperas kuniklo. |
| 3. | **Ni vidas ĝiN** | Vi bezonas akuzativoN kun du-liga verbo. Ĝi indikas la objektoN. | La magiisto prenis la kunikloN. Feliĉe, li ne prenis miaN hundoN. |
| 4. | **En la O** | Pri la akuzativo – Memoru: Ne uzu akuzativon post prepozicio... | Sur la tablO. Inter arbOJ. Pri mi. Dum la matenO. Al urbO. Post tiO. |
| 5. | **En la ON** | ... krom se io iras EN ION aŭ SUR ION. (t.e. *al* sur, *al* en, *al* apud, *al* trans) | En la ĝardenoN. Sur la tabloN. Apud la muroN. Trans la stratoN. |
| 6. | **Du minutojN** | Uzu akuzativon se vi ellasas prepozicion, kutime *je* aŭ *dum*. Ne faru tro ofte! | Lundon mi venos (Je lundo). Ni studis du horojn. (Dum du horoj) |

• Ofte ni formas verbon el du verboj, ekzemple: Mi volas iri al la urbo, Mi devas segi lignon. Mi intencas viziti vin. Mi scias kuri ĝis la pinto de la monto. Notu, ke ĉiam la dua verbo decidas, ĉu la tuta du-vorta verbo estas unu-liga aŭ du-liga. (Volas iri = unuliga; devas segi = duliga; intencas viziti = duliga; scias kuri = unuliga)

• Eblas formi eĉ tri-vortajn verbojn, ekz. 'Mi devus povi sukcesi', 'Mi insistas veni viziti vin.' Same, la lasta el la unuopauj verboj decidas – se ĝi estas unuliga, la tuta tri-vorta verbo estas unuliga. Se la lasta verbo estas duliga – ankaŭ la tuta tri-vorta verbo estos duliga.

• Rimarku, ke foje la objekto povas esti parolo! Mi diris: "Venu!" Kion vi diris? Mi diris tion!

Nun kuraĝe pluiru al la sekvonta paĝo, kie atendas vin kelkaj pli simplaj ekzercoj por helpi vin apliki la regulojn!


## Analizu la frazojn!

Nia tabelo sur la antaŭa paĝo montras la ses orajn regulojn. La dek frazoj aŭ frazeroj sube ilustras tiujn regulojn. Pri ĉiu frazo, diru kiun regulon ĝi ekzempligas. Skribu la regulo-numerojn unu ĝis ses por ĉiu, en la ĝusta ordo. Post la kvina cifrero aldonu la ciferon 'naŭ' kaj pluskribu la ceterajn kvin ciferojn. Nun vi skribis numeron, kiu estas tre grava en la matematiko, precipe en la geometrio. Ĉu vi scias, kiun numeron vi skribis?

1. Mi rompis tason.
2. Ĝi estis valora.
3. Ve! ... Sur la planko.
4. Panjo estos kolera.
5. Sub la tapiŝon!
   (*skribu 'naŭ'*)
6. Sed mankas unu taso.
7. Solvo..solvo? Unu momenton!
8. Panjo ... en la ĉambron!
9. Ŝi vidas la mankantan tason kaj la malglatan tapiŝon.
10. Mi ... en la liton.

Tiuj frazoj kaj frazeroj estas tre mallongaj, kaj per ili oni povas verki nur tre simplan rakonton. En natura skribo aŭ parolo, ni formas pli longajn kaj komplikajn frazojn. Por fari tion, ni kombinas la diversajn regulojn. Sube ni prezentas dek du frazojn, kiuj ekzempligas kombinojn de la ses reguloj. Dekstre ni skribas tiujn kombinojn, sed en la malĝusta ordo. Ligu la cifero-vicojn kun la frazoj al kiuj ili ligiĝas:

1. En la besto-ĝardeno mi vidis kamelon. . . . . . . . . . . . . . . . . . 1+1
2. Abelo flugis en la ĉambron. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 2+4+5
3. En la mondon venis nova sento. . . . . . . . . . . . . . . . . 6+6+5+2
4. Metu la sukeron sur la tablon. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1+3
5. Mi estas certa, ke tio estas serpento. . . . . . . . . . . . . . . . 4+3
6. Buso iris laŭ la vojo en la tunelon. . . . . . . . . . . . . . . . 3+4+4
7. Trajno estas transportilo, kiu havas radojn. . . . . . . . . . . . . 3+5
8. Tio estas eleganta solvo por la problemo. . . . . . . . . . . . . . 3+4
9. Ni legis poemojn en la mateno dum la leciono. . . . . . . . 1+2+4+4
10. Ĵaŭdon, la duan de julio, je la oka horo okazos la kunveno. . . . . 2+5
11. Trajno estas transportilo, kiu iras per radoj sur reloj. . . . . . . . 1+4
12. *Juna amiko* nun havas tridek du paĝojn en ĉiu numero. . . . . . . 5+2



# KRUCENIGMO

(R) = Uzu nur la' radikon

## Horizontale

1. Unua parto de la kaŝfrazo pri nia revuo.
9. Buteron ni ŝmiras ......... panon.
10. Vorto por akiri informojn pri la tempo.
11. *Skribita ordon'.*
12. Inter la ovo kaj la kokino.
14. Kred', supoz'.
16. Aldone al 29: perforte malaperis.
17. Senaerig', ekzemple de aŭta radringo.
18. Barilo kontraŭ tro da akvo.
20. Grup'.
21. Froti, forigi pecetojn de ligno aŭ metalo aŭ eĉ fromaĝo (R).
23. Mal-ene.
24. Forigi, malekzistigi, kutime per ordono.
26. Mi certas, ......... vi pravas.
27. Bluigi ion: kaŭzi, ......... ĝi estu blua.
28. Natura procezo, per kiu roko-pecoj forfalas de *montoj. (R)*
29. Ni pensas kaj sentas ......... cerbo.
30. Grupo de informoj, unu sub la alia (R).
32. Mi plus vi.
33. Bone konata, renoma.
34. La mikso de gasoj, kiun ni spiras.
36. Ni povas uzi Esperanton ......... kontakti eksterlandanojn.
37. La koloro de karbo kaj duono de zebro.
39. Sentima, preta fari malfacilan aŭ eĉ danĝeran taskon.
41. Paro da kantistoj.
42. *Koloro de ĉokolado aŭ triono de ĝirafo* (R).
44. Prefikso, kiu signifas mal-kune.

## Vertikale

1. Ni ekskursis ........ kvar horoj.
2. Metropole, ekz. Londone, Parize, Nov-Jorke, Ĝeneve.
3. Komencis.
4. ......... vi estas? Studento!
5. Emfaza vorteto.
6. Amindumi (R).
7. Speaco da oleo uzata multe en mediteraneaj landoj.
8. Vorto utila por montri aferojn.
9. Dua parto de la kaŝfrazo pri nia revuo.
13. Urbo en Sud-Ameriko, kie okazis ekologia konferenco en junio 1992.
15. *Agi kiel agento. En tridek landoj iu bonvolas ......... nian revuon.*
17. Promeni per granda ŝipo, t.e. veturi pro

plezuro.
19. La mallonga nomo de la Ligo, kiu nun eldonas nian revuon.
20. Tio, kion oni prenas, por ricevi nian revuon regule.
22. Plan', tabel'.
24. Taŭga afikso por manĝiloj, arboj, domoj, membroj, vortoj aŭ kantoj.
25. Taŭga pronomo por Petro, Johano aŭ Karlo.
28. La aero, kiel portilo de radio-ondoj (R).
29. Strat-festa.
31. Armilo, kiun oni flugigas per pafarko.
33. Malproksima.
35. Ŝteli.
36. Preni venĝon pro krimo aŭ malbona ago.
38. Kelkaj malmultaj.
39. Mal-sen.
40. Mallonga formo de forira saluto.
43. Prefikso kun signifo 'denove'.

Sendu al ni la du kaŝfrazojn sur poŝtkarto ĝis la fino de majo. Ni lotumos premiojn el inter la ĝustaj respondoj.

# ARANĜOJ POR JUNULOJ KAJ INSTRUISTOJ EN 1993

**Aprilo** 3-8: Internacia Metodika Seminario (IMS), Zagrebo, Kroatio. Informoj de KEU, Trg. Burze 2, 41000 Zagreb.

**Majo** 20-22: Sukcena bordo, Liepaja, Latvio. Unu el la temoj estos instruado, kun modellecionoj. Esperanto-Buroo Kemespo, Abonkesto 1064, Liepaja 16, LV-3416 Latvio.

**Majo** 27-30: Intensiva kurso pri komunika instruado. Gvidos Stefan MacGill, laŭ la lernolibro *Tendaraj tagoj*. E-Centro Poprad, Sobotske nám 6, Poprad.

**Junio** 12-17 Somera universitato en Lappeenranta, Finlando. Gvidos Andrzej Pettyn. Informoj: Irja Miettinen, Yrjönkatu 6-8 A 1, SF-53600 Lappeenranta.

**Junio** 28-Julio 16: Someraj Esperantaj Kursoj en la Ŝtata Universitato de San Francisko. Gvidos: David K. Jordan, Mark Fettes, Boris Kolker. Detaloj de Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010.

**Junio** 28-Julio 2: lerneja kurso en Tampere. Gvidos Eva Farkas-Tatár kaj Luc Feidangai.

**Julio** 4-9: Somera universitato en Jyväskylä. Informoj pri ambaŭ S. Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, SF-40640 Jyväskylä.

**Julio** 8-4 aŭg: Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé, Cseh kursoj A kaj B. Gvidas Eva Bondar kaj Kimie Markarian.

**Julio** 9-17: Intensiva Du-semajna kurso por Instruistoj: ILEI/KCE, La Chaux-de-Fonds, Svislando. Gvidos d-ro Duncan Charters, profesia trejnisto de lingvo-instruistoj en Kolegio Principia, Ilinojso, Usono.

**Julio** 17-18: Sesio de la elementa kaj meza lingvo-ekzamenoj de UEA/ILEI, en Kultura Centro Esperantista (KCE). Nedeviga prepar-kurso estos ofertata antaŭe de s-ino Smidéliusz Katalin (Hungario).

**Julio** 24-31. Universala Kongreso de Esperanto, Valencio.

**Julio** 31-6 Aŭg.: 27a Konferenco de ILEI kune kun la 2a ILEI-Gimnazio. La Paterna, Valencio, Hispanio. Aliĝilo en *Internacia Pedagogia Revuo* numero 93/1.

**Julio** 31-8 Aŭg.: Internacia Junulara Semajno, en kastelo Mikosszéplak en sud-okcidenta Hungario. HEJ, Tibor Budai, pk. 263, H-8901 Zalaegerszeg. Poste komuna karavano al...

**Aŭg** 7-14: 49a Internacia Junulara Kongreso, Vraca, Bulgario. Aliĝiloj de la CO de UEA au LKK: pk 26, BG-3000 Vraca.

**Aŭg** 19-31: Por la instruantoj, pedagogia helpo, instruiloj, kursoj. Kastelo Grésillon.

**Okt.** 14-17: Intensiva kurso pri komunika instruado (vidu sub majo.)

Aliĝiloj por la instruistaj kursoj aperis en *IPR 92/4. Ni provas aranĝi inter* KCE, ILEI kaj UEA kelkajn stipendiojn por faciligi al instruistoj aktive instruantaj aŭ -ontaj Esperanton en landoj kun malfacilaj cirkonstancoj, la partoprenon en instruistaj kursoj.

Kultura Centro Esperantista ofertas programojn tutjare, ilia belaspekta 'Ĝenerala Programo' aperis por 1993, petu ĝin de KCE, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Same Kastelo Grésillon kaj E-Centro Poprad proponadas aranĝojn.

# REZULTO DE LA KONTAKTILO PRI LERNEJAJ KLASOJ 1992/93

La vicordo de la informoj estas:

1) Lando, Urbo, Lernejo-nomo, evtle. adreso (aldonu mem la urbo-nomon kaj landnomon).
2) Nomo de instruisto, evtle. adreso.
3) Nombro de lernantoj, aĝo, kaj dato de ekstudo.
4) Ĉu la klaso estas plene oficiala? Ĉu partopreno estas deviga post elekto? Ĉu hobia grupo ekster lernejaj horoj? Ĉu okazas ekzameno fine de la kurso? Ĉu la instruisto estas salajrata?
5) Nombro da lecionoj en la kurso. Nombro semajne.
6) Stud-temoj de la instruisto; lernolibroj uzataj.
7) Kontaktoj serĉataj.

## Albanio

**Tirana**, Shkolla e Mesme Tekstil-Konfekcion, L.G. Kombinat; 50 Vjetori i Pavaresise. 2) Bardhyl MEZINI. 3) 30; 15-17-jaraj; Jan 92. 4) neoficiala; nedeviga; nehobia; kun ekzameno; Ne-salajrata. 5) 20; 1. 6) -, Vasil Pistoli, Seppik, Fundamento de Eo; Cvicebnice Esperanta (ĉeĥa). 7) La lernantoj havas korespondamikojn. Somere 18-homa grupo vojaĝis al Vraca, Bulgario. Nun ni provas havi kontaktojn kun Bari, Italio. Deziras kontaktojn kun similaj metiaj (teksejaj) lernejoj, prefere en najbaraj landoj. Gastoj bonvenaj; gastigo ofertata. Bezonatas legolibroj, instruiloj, revuoj (inkl. malnovaj).

## Belgio

**Oostende:** E. van Glabbeke, A. Vermeylen Str. 71, B-8400. 2) Raymond WYLLEMAN. 3) 21+13; 9-12-jaraj. 4) Neoficiala; deviga; hobia; sen ekzameno; nesalajrata. 5) nefiksita, 2 po 30min. 6) -, Mikulás. 7) Partoprenas en 'Mondo-rondo'. Volonte eniras ĝemeligan aranĝon kun klasoj de similaĝaj lernantoj. La loka E-grupo bonvenigas gastojn. Aprezus raportojn pri alies spertoj, metodoj kaj pri ludoj.

**Oostende:** Skoltejo Bredene. 2) Marc CUFFEZ, Elizabethlaan 295, B-8400. 3) 3; 16-18-jaraj; ekde okt. 92 (rapidkurso). 4) Neoficiala, nedeviga, nehobia, sen ekzameno, ne-salajrata. 5) 16, 4. 6)-,Ĵamborea Lingvo, MacGill (Tendaraj tagoj). 7) Dezirus ĝemeliĝi kun aliaj skoltaj klasoj el Eŭropo.

## Francio:

**Fougueyrolles:** Ecole Publique, F-33200. 2) Aline BAUBIAS, Isabelle MARTINEZ. 3) 10, 7-12-jaraj, ekde okt 90, 91, 92. 4) Neoficiala, nedeviga, hobia, sen ekzameno, salajrata. 5) -,1. 6)-, Charlotte Kohrs, Cours Rationnel.

**Outreau:** Collège Albert Camus, Rue Président Kennedy, F-62230. 2) Monique NOEL. 3) 49, 11-15-jaraj ekde 91 kaj 92. 4) Oficiala, nedeviga, hobia, sen ekzameno, nesalajrata. 5) -, diversaj grupoj havas po unu lecionon semajne, la instruisto gvidas dum 8 horoj/semajne. 6)-Tendaraj tagoj. 7) Partoprenas la ILEI-konkursadon. Deziras individuan kaj grupan korespondadon. Interŝanĝus informojn pri la regionoj, kutimoj ktp. Volonte ĝemeliĝus kun samaĝaj klasoj.

**Pineuilh:** Ecole Publique, F-33220. 2) Laura VIEILLEFOND. 3) 10, 8-11-jaroj, Ekde okt. 90, 91 kaj 92. 4) Neoficiala, nedeviga, hobia, sen ekzameno, nesalajrata. 5) -,1. 6)- ,Libretoj de Charlotte Kohrs 'Kantu Esperante, Ni esploru la Mondon'. 7) Membroj de 'Mondo-rondo'. Jam havas kontaktojn, deziras starigi ĝemelajn rilatojn kun klaso en Afriko. Gastoj bonvenaj. Plia grado de oficialeco dezirinda.

**Ste Foy-la-Grande:** Lycee Elisée Reclus, F-33220. 2) Sabine ARDOVIN, Joel LAPOR-

TE, Lucie TA QUANG. 3) 4, 16-17-jaroj; du niveloj - okt 89, okt 92. 4) Neoficiala, deviga, nehobia, kun ekzameno, nesalajrata. 5) -,1. 6) Nouveau Cours Rationnel. Korespondkurso de 'Kvin petaloj', Paŝoj al plena posedo (Auld). 7) La klasanoj jam korespondas. Gastoj bonvenaj. La kondiĉoj favoriĝus se Eo povus eniri la abiturientajn ekzamenojn.

**Ste Foy-la-Grande:** Ecole Publique, Place du Champ de Foire, 33220. 2) Laura VIEILLEFOND, Marilyn DANTON. 3) 18, 6-11-jaraj, ekde okt 91 okt 92. 4) Neoficiala, nedeviga, hobia, sen ekzameno, nesalajrata. 5) -,1. 6) Junulkurso de SAT. Charlotte Kohrs. 7) Deziras kontakton kun klasoj el Kebekio. Gastoj bonvenaj.

**Port Ste Foy:** La du supraj instruistoj plie gvidas du klasojn ĉi tie. 3) 18, 7-12-jaraj kaj 10, 11-14-jaraj.

## Jugoslavio

**Novi Becej:** Elementa Lernejo 'Miloje Ciplic', ul. Marsal Tita 5, YU-23272. 2) Agnes SANISLO. 3) 18, 12-jaraj. Sept 92. 4) Neoficiala, nedeviga, hobia, sen ekzameno, nesalajrata. 5) 40,2. 6)-,Antonije Sekelj, Esperanto per vortaro. 7) La grupo korespondas. Deziras individuajn kaj grupajn kontaktojn, interŝanĝi desegnaĵojn.

## Kroatio

**Zagreb:** "Dragutin Domjanic", S. Allendea 66, HV-41000. 2) Marija BELOSEVIC. 3) 18, 11-15-jaraj. okt 92. 4) Deviga, hobia, kun ekzameno, nesalajrata. 5) 70,2. 6) Tendaraj tagoj. 7) Deziras korespondi individue kaj grupe, interŝanĝi desegnaĵojn, poemojn, murgazetojn. Ĝemeliĝo bonvena. Vizitantaj instruistoj bonvenaj. Bezonataj estas ludiloj, kartaroj, vidbendoj.

**Zagreb:** "Bartol Kasic", Vrisnicka 44, HV-41000. 2) Kiel supre. 3)_ 21, 11-15-jaraj okt 92. 4) Oficiala, deviga, hobia, kun ekzameno, ne-salajrata. 5) 70,2. 6) Gerda Malaperis (Piron). 7) Vidu supre.

(Plie s-ino BELOSEVIC gvidas trian samaĝan grupon en lernejo "Medvedgrad", kie okazas E-kursoj kontinue de 1973.

## Usono:

**Chicago:** Alcott, 2625 N. Orchard, IL 60614. 2) Caroline WHALEN kaj Joyce LUSIS. 3) 10, 11-12-jaraj, okt 91, sept 92. 4) Oficiala, nedeviga, salajrata. 5) 85,3. 6) Bibliotekisto, instruisto en 7a klaso, Mikulás, Vortaro Wells, Kohrs. Junulkurso. 7) Ricevis 50 korespondaĵojn el 20 landoj. Petas grupan korespondadon. Volas ĝemeliĝi. Akceptas gastojn.

**Chicago:** Carver Middle School, 801 E. 133 Place, IL 60627. 2) Adrienne LE DREE. 3) 35,9-14-jaraj, okt 92. 4) Oficiala, nedeviga, nehobia, sen ekzameno, salajrata. 5) 100,4. 6) Memhelpo por sendependa vivado. Vortaro Wells, ĉinaj libretoj, Kohrs. 7) 100 korespondaĵoj el 25 landoj. Petas grupan korespondadon, interŝanĝos klasfotaĵojn. Gastoj bonvenaj. Bezonas multnaciajn librojn kaj afiŝojn. (s-ino LE DREE gvidas duan grupon samlerneje de 12-16-jaraj mensdebilaj lernantoj. Ŝatus interŝanĝi artaĵojn kaj manfaritaĵojn. Volonte ĝemeliĝus kun grupoj en Japanio aŭ Afriko.

**Chicago:** Joplin, 7931 S. Honore, IL 60620. 2) Ruby BOWEN. 3) 15, 10-12-jaraj, ekde mar 92 kaj okt 92. 4) Oficiala, nedeviga, nehobia, kun ekzameno, salajrata. 5) 100,4. 6) Matematiko en 8a klaso. Mikulás, ĉinaj libretoj, ELNA-kalendaro. 7) 65 gratuloj ricevitaj el 15 landoj post gazet-anonceto. Deziras grupan korespondadon, evtle. kun telefona interparolo (tri lernejoj en Ĉikago petas senkostan uzon de internacia telefonservo por edukaj celoj). Ĝemeliĝo kun Afriko dezirata. Bonvengas gastojn.

**Chicago:** Sama lernejo. 2) Patricia BRADLEY. 3) 18, 8-10-jaraj, okt 92. 4) Oficiala, nedeviga, nehobia, kun ekzameno, salajrata. 5) 100,4. 6) 3an klason. Dori Kehler laborlibro, perpoŝta kurso, materialoj de SFSU. 7) Deziras grupan korespondadon, interŝanĝi desegnaĵojn, manfaritaĵojn, ĝemeliĝi kun samaĝuloj el Afriko. Gastoj bonvenaj.

**JEN VIA KONTAKTIGA SERVO ORGANIZITA DE ILEI.**
**Ni dankas la respondintojn! SUKCESAJN KONTAKTOJN!**

## ABONANTOJ DE JUNA AMIKO

| Lando | 1987 | 1988 | 1989 | 1990 | 1991 | 1992 |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Hungario | 837 | 951 | 873 | 830 | 290 | 43 |
| Rumanio | | | | 1 | 254 | 58 |
| Jugoslavio | 10 | 102 | 297 | 181 | 250 | 13 |
| Sovet-Unio/Rusio | 1148 | 1468 | 1666 | 1432 | 209 | 207 |
| Ukrainio | - | - | - | - | - | 71 |
| Bulgario | 240 | 221 | 252 | 226 | 134 | 2 |
| Italio | 14 | 18 | 32 | 40 | 119 | 94 |
| Usono | 7 | 28 | 36 | 50 | 89 | 63 |
| Pollando | 5 | 36 | 77 | 70 | 70 | 9 |
| Kubo | 5 | 8 | 8 | 100 | 61 | 9 |
| Togolando | 0 | 0 | 0 | 51 | 52 | 24 |
| Francio | 7 | 37 | 44 | 64 | 49 | 62 |
| Brazilo | 17 | 31 | 41 | 86 | 46 | 25 |
| Svedio | 5 | 43 | 32 | 52 | 45 | 54 |
| Germana DR | 130 | 161 | 180 | 141 | – | – |
| FR Germanio | 30 | 47 | 32 | 49 | 45 | 28 |
| Israelo | ? | ? | 1 | 34 | 42 | 37 |
| Belgio | 7 | 15 | 16 | 34 | 38 | 15 |
| Britio | 18 | 57 | 51 | 49 | 29 | 31 |
| Ĉinio | 0 | 0 | 0 | 5 | 27 | 22 |
| Tanzanio | 0 | 0 | 5 | 23 | 23 | 28 |
| Aŭstrio | ? | ? | 9 | 8 | 19 | 14 |
| Estonio | – | – | – | – | 16 | 12 |
| Ĉeĥoslovakio | 180 | 203 | 220 | 70 | 15 | 17 |
| Benino | 0 | 0 | 0 | 13 | 13 | 12 |
| Kanado | 5 | 8 | 5 | 11 | 13 | 4 |
| Hispanio | ? | ? | 4 | 18 | 11 | 1 |
| Litovio | – | – | – | – | 11 | 65 |
| Ebura Bordo | 0 | 0 | 0 | 11 | 11 | 3 |
| Madagaskaro | 0 | 0 | 0 | 8 | 11 | 6 |
| Norvegio | ? | ? | 4 | 6 | 11 | 10 |
| Nederlando | 17 | 11 | 11 | 5 | 10 | 11 |
| Aŭstralio | 5 | 9 | 8 | 11 | 10 | 17 |
| Albanio | 0 | 0 | 0 | 0 | 8 | 8 |
| Zairio | 0 | 0 | 0 | 8 | 8 | 3 |
| Kamerunio | 0 | 0 | 0 | 6 | 6 | 6 |
| Koreio | ? | ? | 4 | 4 | 6 | 31 |
| Hinda unio | 0 | 0 | 0 | 0 | 6 | 2 |
| Meksikio | 0 | 0 | 0 | 0 | 6 | 2 |
| Irano | 5 | 5 | 3 | 2 | 5 | 2 |
| Venezuelo | ? | ? | 2 | 5 | 3 | 1 |
| Argentino | 0 | 0 | 0 | 4 | 4 | 3 |
| Japanio | ? | ? | 1 | 4 | 4 | 4 |
| Senegalio | 0 | 0 | 0 | 4 | 4 | 6 |
| Mongolio | ? | ? | ? | 3 | 3 | 3 |
| Niĝerio | 0 | 0 | 0 | 3 | 3 | 3 |
| Kroatio | 0 | 0 | 0 | - | | 100 |
| **Landoj sume** | ? | ? | | 33 | 48 | 64 |
| Okcidente . 6 | 138 | 311 | 333 | 553 | 603 | 500 |
| **Tutmonde** | 2725 | 3561 | 4122 | ĉ3800 | 2284 | 1263 |

Jen ne tro gajiga tabelo de nia legantaro en 1992. En Hungario, Rumanio, Jugoslavio, Bulgario kaj Brazilo ni suferis sovaĝajn perdojn, pro ekonomiaj faktoroj ekster nia rego.

Ĝojige estas nur kelkaj landoj: Usono, Francio, Italio Koreio, Latvio, Ukrainio, Kroatio kaj Svedio precipe.

Ni plue presas la revuon en 2500 ekz. ĉar ne indas presi malpli. Sekve, kvankam ILEI donacadas plurajn centojn da ekzempleroj, restas grandegaj stokoj de la numeroj el 1992.

Kontraŭ 8 respondkuponoj (la nuraj poŝtkostoj), ni volonte sendos 8 jarkolektojn (1 kg.) al adreso de via elekto.

**SUPER ĈIO, GRAVE NECESAS PLI DA ABONANTOJ POR 1993!**

# Deziras korespondi

*Korespondpetojn de junuloj ĝis 20-jaraj kaj instruistoj ni aperigas senpage.*

## Ĉeĥio

**Pavel Herzog**, 8-jara knabo, Dlouhonovice 126, 564 01 Zamberg. Kolektas neuzitajn bildkartojn de ĉevaloj.

## Hungario

**Barany Jozsef**, 19-jara knabo, dez. kor. tutm. kun samaĝuloj. H-8351 Sumegpraga, Mezo u.1.

**Timko Tibor**, 20-jara knabo dez. kor. kun knabinoj, pri diversaj temoj. H-5051 Zagyvarekas, Erdo ut.11.

## Kubo

**Dora Lina Arguelles Mayo**, 42-jara patrino kun Mei Ling Leon — 9-jara filino. Dez. kor. tutm. kolektas poŝtmarkojn. Cristino Barreda 21 elt 31 y 33 Alturas de Buena Vista. Las Tunas.

## Litovio

**Monika Vaicekauskaite**, 15-jara knabino dez. kor. tutm. pri muziko kaj dancoj. Volonte interŝanĝos donacetojn. LIT-5300 Panevezis, Artoju 3-5.

**Mindaugas Mazilis**, 15-jara knabo dez. kor. tutm. pri sporto kaj turismo. Volonte interŝanĝos bildkartojn. LIT-5307 Panevezis, Velzio Kelias 78.

**Evaldas Urbanas**, 15-jara lernantino dez. kor. tutm. pri aŭtoj kaj interŝanĝi donacetojn. LIT-5300 Panevezis, Kniaudiskiu 71-25.

## Rumanio

**Ilona Bakai**, 16-jara knabino. RO-4174 Praid, nr. 455. jud. Harghita.

**Kalman Parajdi**, 22-jara knabo. RO-4171 Ocna de Sus, nr. 437. jud. Harghita

Karegaj Geamikoj!

Ankoraŭ-foje ni petegas vin — bonvolu tre klare skribi la korespondpetojn. Tre multaj el ili estas tuttute nelegeblaj kaj ni ne povas ilin deĉifri. Almenaŭ la adreson bonvolu nepre skribi majuskle!

---

**PERANTAJ ADRESOJ: Ni anoncas du ŝanĝojn:**

**Aŭstralio:** AEA-Libroservo, P.O. Box 230, Matraville N.S.W. sed akceptas abonojn nur de oktobro ĝis majo.

**Koreio:** Librejo GAJA, s-ro Lee Jung-Kee, CPO Kesto 3047, KR-100-630 Seulo.

---

*Juna amiko* kore dankas al la sekvaj legantoj, kiuj faris donac-abonojn, por helpi al ni sendi la revuon al junuloj en foraj landoj:

s-ino Nora Caragea, Germanio
s-ro Karl-Erik Eriksson, Svedio
s-ro Kjell Persson, Svedio

Ni urĝe bezonas pli da simila apogo, kaj super ĉio, pli da abonantoj! Bonvolu ĉiuj helpi: montru la revuon al viaj amikoj, montru la ekstrajn paĝojn, la belajn desegnaĵojn, la materialon por ĉiuj aĝ-grupoj. Konvinku instruistojn preni kvantan mendon por uzo en la lerneja klaso!

# LA KVAR-RESPONDA KVIZO

**Nur unu el la kvar respondoj estas korekta — sed kiu!?**

**1.** Kiu estas 'la ruĝa planedo'?
**A:** Venuso. **B:** Tero. **C:** Marso. **Ĉ:** Pluto.

**2.** Kiam esperantistoj festas Zamenhof-tagon? La ....... de decembro.
**A:** 5-an **B:** 15-an **C:** 20-an **Ĉ:** 31-an

**3.** Flago, kiu indikas, ke ŝipo estas forironta estas blanka kaj...
**A:** blua. **B:** verda. **C:** ruĝa. **Ĉ:** nigra.

**4.** Kiom valoras 'X' en la romia kalkul-sistemo?
**A:** Mil. **B:** Kvindek. **C:** Dek. **Ĉ:** Kvin.

**5.** Kiom da kernoj enhavas ĉerizo?
**A:** Unu. **B:** Kvar. **C:** Pli ol mil. **Ĉ:** Ok.

**6.** Kiom da ĝiboj havas dromedaro?
**A:** Unu. **B:** Du. **C:** Tri. **Ĉ:** Kvar.

**7.** Kiom da semajnoj estas en jaro?
**A:** 26. **B:** 52. **C:** 54. **Ĉ:** 84.

**8.** Kiu el la sekvaj estas duon-vokalo?
**A:** j. **B:** aŭ **C:** l. **Ĉ:** u.

**9.** De kiu besto venas lano?
**A:** Ŝafo. **B:** Kokino **C:** Porko. **Ĉ:** Bovo..


**10.** En muziko, kion signifas la termino 'piano'?
**A:** Laŭte. **B:** Kviete. **C:** Rapide. **Ĉ:** Vigle.

**11.** Kiu estas la finna mon-unuo?
**A:** Marko. **B:** Krono. **C:** Franko. **Ĉ:** Finno.

**12.** Kiam okazis la unua Universala Kongreso de Esperanto en Ameriko?
**A:** 1910. **B:** 1956. **C:** 1965. **Ĉ:** 1986.

**13.** Beirut estas la ĉefurbo de kiu lando?
**A:** Sirio. **B:** Liberio. **C:** Libano. **Ĉ:** Libio.

Rigardu la unuan bildon kaj poste serĉu laŭvice bildon, kiu havas unu plian elementon. En la kadroj notu la literon de la laŭvicaj bildoj. La solvon bonvolu sendi al ni ĝis la 30ª de aprilo.




# Juna amiko

40 HUF

INTERNACIA KVARONJARA LERNEJANA ESPERANTO-REVUO

